


SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1995:1

HUR SER DET UT I



I BÖRJAN AV MAJ?
KOM OCH SE DET MED EGNA ÖGON.
OCH TA ÖRONEN MED. FÖR DÅ KOMMER
DET ATT TALAS ESPERANTO I HJO SOM
ALDRIG FÖRR. PÅ SEFs ÅRSKONGRESS.

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Februaro 1995 • 83-a jarkolekto
Fondita en 1913

Tillf. redaktion/provizora redakcia grupo:

Agneta Emanuelsson
Kaisa Hansen (red. sekreterare)
Franko Luin (teknisk redaktör)
Bengt Nordlöf

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: Rönquist & Co, Sollentuna 1995

Prenumeration 1995: 150 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 80 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1995:

Direktansluten medlem 150 kr.
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund, och får den nordiska ungdomstidningen *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Mollévångsgatan 20 B, 214 20 Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj; torsdagar kl. 17-18.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson, Storgatan 13,
753 31 Uppsala

Kallelse till årsmöte

Andelsägarna kallas härmed till ordinarie årsmöte på Hotell Bellevue i Hjo, den 6 maj 1995 kl 9.00.

Esperantoförlagets styrelse

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

Per Aarne faras paŭzon

Per Aarne Fritzon, kiu redaktis *La Esperon* dum la lastaj jaroj, petis, ke la estraro liberigu lin de tiu tasko.

Depost unu jaro Per Aarne studas ĉe la ĵurnalisma altlernejo en Stokholmo. Pasintjare ankoraŭ eblis kombini studojn kaj redaktadon de *La Espero*, sed en la nuna semestro la studoj postulas for-eston el Stokholmo, foje plurajn monatojn sinsekve, ĉar ili estas kombinitaj kun praktikado ĉe diversaj gazetaj redakcioj. Ĝis majo li estos, ekzemple, en Västerås ĉe VLT.

La estraro notis lian peton kun tre granda bedaŭro. Per Aarne dediĉis multan tempon al la redakta laboro. Lia intenco ĉiam estis, ke la membroj kun fi-ero povu montri sian membro-gazeton, ankaŭ al eksteruloj. Specialan streĉon li dediĉis al la svedlingvaj informaj numeroj, kiuj per riĉeco da argumentoj kaj ekzemploj tre taŭge prezentis esperanton.

Por ke la gazeto aperu seninterrompe, estas starigita provizora redakta grupo. La estraro celas kiel eble plej baldaŭ trovi definitivan solvon.

Al Per Aarne ni deziras bonan sukceson en liaj studoj kaj baldaŭnan revenon al la redakta laboro ĉe *La Espero*.

Mil dankojn!

Al Klubo 1000 kontribuis:

Ulla Luin, Tyresö	2000:--
E-klubo de Jönköping	1000:--
Nils Olsson (testamente)	1000:--
Sten Broman, Skövde	1000:--

Al Klubo Cent kontribuis:

Esp-klubo de Ljungby	100:--
Gustav Nygård, Göteborg	100:--
Brita Lindberg, Degeberga	100:--
A-G kaj J Strönne, Malmö	200:--
A kaj N Johansson, Norrk.	200:--

Generalaj donacoj:

Memore al Nils Olsson, Höör:

L kaj B Andreasson, Hörby	200:--
Mellanskånska E-klubben fam. Krondahl, S Nilsson	300:--

Memore al Ove Kleborg:

Sigurd Olsson, Ströms.br.	300:--
---------------------------	--------

Cetere:

Anonime al bankĝiro	400:--
Hans Nordlund, Särö	200:--
Sten Svenonius "kun saluto de J Snarberg"	100:--
Reimar Adler, Lyckeby	100:--
Leif Nordenstorm, Boden	50:--

SEF kore dankas ĉiujn donacintojn (kaj donacintojn).

Pliaj donacoj estas bonvenaj al postĝiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDETS STYRELSE

Ordförande: Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Handen,
tel. 08-777 41 75

Vice ordförande: Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
tel. 08-712 82 91

Sekreterare: Kaisa Hansen, Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby,
tel. 08-590 88210

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,
tel. 0500-41 22 05

Ledamot: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas väg 6, 641 37 Katrineholm,
tel. 0150-523 87

Ledamot: Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 129 44 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Ledamot: Aira Kankkunen, Dr Forselius gata 60, 413 26 Göteborg,
tel. 031-18 79 82

Suppleant: Anita Bergh, Hasselgatan 60, 2 tr, 194 37 Upplands Väsby,
tel. 08-590 858 72

Suppleant: Jill Hilford, Sockengatan 113, 252 51 Helsingborg,
tel. 042-13 01 70

SEJUS STYRELSE

Ordförande: Anna-Lena Eriksson, Studentbacken 23/419, 115 57 Stockholm,
tel. 08-667 89 21

Sekreterare: Keiko Snarberg, Björcksgatan 31 B, 416 52 Göteborg,
tel. 031-19 74 87

Kassör: Fredrik Olofsson, Studiegången 3/323, 416 81 Göteborg,
tel. 031-19 84 49

Ledamot: Kajsa Larsson, Lilla Sällskapet väg 50 KV, 127 61 Skärholmen,
tel. 08-97 46 26

Hjo invitas komence de majo al unike ĉarmaj kongresaj tagoj

Ĉijare vi havas la unikan eblecon viziti urbon, pri kiu ĉiuj en Svedio aŭdis, sed multaj fakte vizitis: Hjo, ĉe la bordo de la lago Vättern. Tie okazos la 5an, 6an kaj 7an de majo la jarkongreso de Sveda Esperanto-Federacio.

Hjo identigas sin kun Grönköping, la unika sveda ne-urbo, kun propra semajna gazeto (aperanta monate), kiu parodias la okazojn de nia lando. Tiu gazeto ankaŭ parodias, per sia inventaĵo transpiranto nian propran lingvon esperanto. Ĉu vi pripensintion: oni neniam parodias ion mal-gravan!

Do: nepre ne maltrafu la eblecon konatiĝi kun la urbeto Hjo, kie estus loĝanta magistro Hagvaldo, la fama transpiranto-tradukisto, se Hjo estus Grönköping ankaŭ en la vero.



Rigardo al Hjo de la lago Vättern

SEF invitas la svedajn esperantistojn al la jarkongreso en la ĉarma urbeto Hjo dum la semajnfino 5a, 6a kaj 7a de majo 1995.

Ni povas promesi, ke ni havos unike situantan kongresejon. La granda kaj bela hotelo Bellevue, kie ni loĝos kaj kie okazos ĉiuj programeroj, situas meze en la urbo.

La urba centro, kun tipe eturba placo, estas tuj sude de la hotelo; la vastegega turiste fama urboparko, kiu etendiĝas kelkajn kilometrojn laŭ la bordo de la lago Vättern, estas norde de Bellevue; kaj la ĉarma haveno situas nur kelkajn paŝojn for.

Estu tempo por ĝui la urbon!

Okazos multo, kiel kutime, dum nia kongreso. Sed ni planis la programon tiel, ke la partoprenantoj havos tempon por enspiri la etoson de Hjo kaj konatiĝi kun ĝia tute speciala karaktero. Krome distancoj apenaŭ ekzistas en Hjo.

Uzu iom da tempo por promeni en la proksima parko kun la laŭbordaj migrovojoj, la belaj centjaraj vilaoj kaj la fama papili-kaj akvari-ekspozicio.

Kaj uzu iom da tempo por konatiĝi kun la idiliaj stratetoj flankigataj de bone konservitaj lignaj domoj – ja bone konservitaj tra cent jaroj!

Kaj ankaŭ uzu iom da tempo por vidi la havenon, la multajn fiŝbutikojn kaj la kafejsipon "Trafik", 103-jara renovigita ĉarmulo.

Kongreso en hotelo

Sed plej multan tempon vi uzu por nia propra kongreso kun riĉa kaj varia programo.

La kongreso mem okazos, kiel jam menciite, en la bonklasa hotelo Bellevue, kun bonaj ĉambroj kun necesejoj kaj duŝejoj. Plej multaj ĉambroj havas rigardon al la lago. La restoracio, kie ni havos niajn ĉefmanĝojn, estas granda kaj luksa. La taverno, kie oni servos niajn matenmanĝojn, havas hejmeccan aspekton.

Facile atingebla

La urbo Hjo havas 6 000 loĝantojn, du trionoj el kiuj loĝas en malgrandaj domoj. Ĝi situas 30 km for de Skövde kaj la fervoja linio Stokholmo-Gotenburg. Preskaŭ ĉiun horon aŭtobusoj trafikas la tre bonan vojon Skövde-Hjo.

Se vi veturos per propra aŭto, vi facile atingos la celon en gloro per modernaj ŝoseoj.

Bonvenon al Hjo en majo!

Börje

Papilia glumarko invitas al evento

La kongresa glumarko, desegnita de Kurt Frisk el la klubo de Skövde, montras bildon de bela orienta papilio.

La motivo estas prenita el la fama papili-kaj akvari-ekspozicio en la urba parko, tute najbara al la kongresejo. La ekspozicio estos malfermita por la kongresanoj la 6an kaj 7an de majo (sabate kaj dimanĉe) inter la 10a kaj 18a horoj. La enirkotizo estas 30 kronoj.

En la ekspozicio estas videblaj mil el al plej belaj papilioj de la mondo, 28 fiŝspecoj de Vättern en 30 grandaj akvarioj, skaraboj, vivantaj birdaraneoj, skorpionoj kaj insektoj el la tuta mondo, vivantaj abelejoj kaj poŝtmarkoj kun papilioj el 125 landoj.

Aparta sekcio estas dediĉita al silkraŭpoj el Tajlando; ĝi montras la gravecon de la silkindustrio dum jarmiloj. Eblas aĉeti belajn silkajn teksaĵojn.

GLUMARKOJ!

Mendu kaj uzu la glumarkojn de la kongreso en Hjo!

Por 20 kronoj vi ricevos 10 markojn,
por 30 kronoj vi ricevos 20 markojn,
por 40 kronoj vi ricevos 30 markojn.

Pagu al la kongresa pĝ 481 43 95 - 2 kun indiko "Glumarkoj".

Gravaj diskutoj pri la agado kaj estonteco de lokaj kluboj

PROVIZORA PROGRAMO

por la jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio en Hjo inter la 5-a kaj 7-a de majo 1994

Vendrede la 5-an de majo

15.00	La akceptejo ekdeĵoras en hotelo Bellevue
17.00–18.00	Vespermanĝo
19.00–	Interkona vespero

Sabate la 6-an de majo

08.00	Matenmanĝo
09.00–10.30	Jarkunveno de ILEI, KELI kaj Eldona
10.30–11.00	Kafo
11.00–12.30	SEF kaj la lokaj kluboj (diskuto 1)
12.30	Lunĉo
13.30–14.15	Solena malfermo
14.15–14.30	Paŭzo
14.30–16.00	Jarkunveno de SEF
16.00–16.30	Kafo
16.30–17.30	Prelego (ĉefa)
18.00	Vespermanĝo
19.00–	Distra vespero

Dimanĉe la 7-an de majo

08.00	Matenmanĝo
08.30–09.15	Diservo
09.30–10.30	SEF kaj la lokaj kluboj (diskuto 2)
10.30–10.45	Kafo
10.45–12.00	Aŭkcio
12.15–12.45	Fermo
12.45–13.30	Lunĉo
13.45–	Ekskurso al Skövde* kaj Billingen


* La aŭtobuso haltos ĉe la fervoja stacio en Skövde.

Dum la kongreso en Hjo multa tempo estos dediĉita al diskutoj pri la agado de niaj kluboj. En pluraj lokoj la kluba agado stagnas kaj la membroj avertis, ke estas risko, ke la klubo tute ĉesos agi. En aliaj lokoj junaj entuziasmoj pretras pri tute nova agado, sed mankas al ili ekonomiaj rimedoj kaj spertoj, kiel fondi kaj gvidi klubon. Ekzistas ankaŭ lokoj, kie ekzistas kaj klubo kaj unuopaj novaj entuziasmoj, sed mankas kontakto inter ili.

Kion fari? Kiel helpi al la ekzistantaj kluboj eliri el la kriza situacio? Kia agado taŭgas por niatempa junularo? Kiel instigi al novaj agadoj kaj apogi ilin?

Tio estas gravegaj demandoj kaj ni devas serioze pridiskuti ilin. Je du okazoj ni faros tion en Hjo, sed vi dediĉu jam nun tempon al tiaj demandoj en viaj klubaj kunvenoj kaj sendu viajn reprezentantojn al la kongreso kun faskoj da konkretaj ideoj. Precipe se via klubo estas inter tiuj, kies agado stagnas, ĉi-jare gravas, ke vi estu reprezentitaj.

La moderna hotelo Bellevue estas nia kongresejo. En ĝi ni ankaŭ loĝos kaj manĝos. Ĝia centra situo kaj proksimeco al la haveno certe plaĉos al vi.



Sed ankaŭ distro...

Niaj kongresoj ne estas nur forumoj por serioza laboro, kiel diskutoj kaj jarkunvenoj, sed ankaŭ renkontiĝejoj de malnovaj geamikoj kaj okazo uzi nian unikan lingvon.

Por novaj membroj ili prezentas eblecon ligi novajn kontaktojn kaj ĉerpi ideojn el la agado de aliaj esperantistoj. Kaj ankaŭ por lerni el iliaj malpli sukcesaj faroj.

Sed la kongresoj enhavas ankaŭ pli facilajn programerojn, kiuj malpezigas la kapon kaj distrigas la koron. **inko**

Nur por SEJU!

Ni rezervis por SEJU-membroj kelkajn privatajn ĉambrojn meze en la urbo por 125 kronoj po nokto. Temas pri dultitaj ĉambroj sen matenmanĝo.

Atentu: NUR SEJU!!!

Med bil, tåg och/eller buss

Det är faktiskt ganska lätt att komma till Hjo. Om du kommer med bil kör du i riktning mot Skövde och tar väg 194 till Hjo.

Om Skövde skulle innebära en omväg för dig, kör mot Jönköping och ta väg 195 norrut. Väg 195 tar dig till Hjo även om du kommer norrifrån. Då ska du ta dig till Karlsborg och fortsätta söderut.

Ytterligare en möjlighet är att ta sig till Tidaholm och sedan köra väg 193.

Tåg och buss via Skövde

Om du tänker använda tåget för att ta dig till Hjo, lös din biljett till Skövde. Utanför järnvägsstationen tar du bussen mot Hjo. Efter 40 minuter är du framme. Vardagar går bussarna varje timme, under helgerna mindre ofta. Här är några busstider:

Fredag: 13.35, 14.45, 15.21, 16.22, 17.20, 18.20, 19.25, 21.48.

Lördag: 9.15, 11.00, 13.30, 16.50, 19.25, 21.48.

Hemresan går också via Skövde. På söndag går bussen från Hjo enligt följande tidtabell:

Söndag: 9.45, 13.45, 17.10, 20.05.

Ett utmärkt sätt är annars att ta utflyktsbussen, som kommer att stanna c:a 14.30 utanför järnvägsstationen i Skövde, i god tid före tågens avgång mot Göteborg och Stockholm. Boka din återresa därefter.

Tåg och buss via Jönköping

Jönköping ligger kanske bättre till för dig. Det går nämligen bussar även därifrån till Hjo. Den resan tar 90 minuter. Här är några tider:

Fredag: 12.05, 14.40, 15.25, 16.25, 18.25.

Återresa söndag: 16.10, 20.05.

Två exempel

• Olle och Stina kommer med bil lördag morgon och åker hem på söndag eftermiddag. De bor i dubbelrum och tar alla måltider på hotellet. De skriver på postgirotalongen:

2 A + 2 F för Olle och Stina Johansson

• Emma är 24 år och med i SEJU. Hon kommer med tåg/buss på fredag och stannar hela tiden. Hon bor i privatrum och vill bara ha kaffe på förmiddagen och ett mål mat per dag. Hon skriver på talongen:

C + 2xK + M + L + O + I för Emma Sörman

KONGRESSAVGIFTER

Grundavgift

DELTAGARAVGIFT

Ger dig rätt att delta i kongressens alla programpunkter: föredragen, underhållningen, diskussionerna...

t o m 10 april	200:–	A
efter 10 april	275:–	B
SEJU-medlem	125:–	C

Tilläggsavgifter

LOGI OCH MÅLTIDER

- Du kommer på fredag och stannar kvar till avslutningen och den efterföljande lunchen. Alla måltider ingår fr o m frukost lördag morgon.
två nätter i dubbelrum 1075:– D
två nätter i enkelrum 1475:– E
- Du kommer på lördag f.m. och stannar kvar till avslutningen och den efterföljande lunchen. Alla måltider ingår fr o m lördagens förmiddagskaffe.
en natt i dubbelrum 850:– F
en natt i enkelrum 1050:– G

ENDAGSDELTAĞARE

Du är med på kongressen bara under lördagen. Du betalar sänkt deltagaravgift och för de måltider du beställer från listan nedanför:

<i>Deltagaravgift lördag</i>	150:–	H
------------------------------	-------	---

BUSSUTFLYKT SÖNDAG

Efter lunchen startar bussen mot Skövde med besök till Billingen och rundtur i staden. Lämplig även för deltagare som ska vidare med tåg från Skövde.

<i>Bussutflykt</i>	75:–	I
--------------------	------	---

ENSTAKA MÅLTIDER

<i>kaffe (förmiddag, eftermiddag)</i>	à 25:–	K
<i>lunch (lördag, söndag)</i>	à 125:–	L
<i>middag (lördag)</i>	210:–	M

Frukost ingår i rumspriset och behöver inte anges. Vad gäller kaffe eller lunch, ange hur många gånger du vill ha dem, t.ex. 4 x K.

SEJU-LOGI

SEJU-medlemmar kan bo i privatrum för 125:– per natt (utan frukost).		
<i>1 natt i tvåbäddsrum (ange vilken natt)</i>	125:–	N
<i>2 nätter i tvåbäddsrum</i>	250:–	O

LÄGG 10 APRIL PÅ MINNET!

Vi behöver din beställning senast den 10 april för att kunna reservera rum efter ditt önskemål. Det går bra att komma med en delbetalning. Använd postgiro 481 43 95-2, SEF-jarkongreso, och ange på talongen med koderna vad du beställer och för vem.

Uppllysningar: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500 - 41 22 05.

Rekorda nombro partoprenos la kongreson en Tampere

Meze de januaro la organizantoj de la ĉijara Universala Kongreso povis registri la 1400-an aliĝon, kaj oni jam prognozas, ke pli ol 3000 esperantistoj partoprenos en Tampere. Ĝi estos la plej amasa esperanto-aranĝo en nia parto de Eŭropo. Iam ajn. La distanco al la "fora" nordo evidente ne timigas.

La kresko de la nombro da partoprenantoj en la Universalaj Kongresoj estas pli ol io ajn signo de la forto de la esperanto-movado, malgraŭ kelkaj signoj

pri organizaj problemoj en unuopaj landoj.

Por ni svedoj vojaĝo al Tampere estas preskaŭ neglektebla distanco. Certe daŭros multajn jarojn antaŭ ol ni havos Universalan Kongreson tiel proksime.

La programo de la kongreso konsistas el abunda koktelo da kunsidoj, prelegoj, artaj kaj distraj aranĝoj, ekskursoj, kabaredo, teatro... Oni plej verŝajne ĝuste nun estas finpoluranta la detalan programon, kiu aperos en la kongresa libro.

ciala variaĵo. La temo de la asembleo estos nome minoritatoj, kaj pri tio esperantistoj sufiĉe kompetentas. Sed ĉu ili ankaŭ estas pli toleremaj ol multaj ŝtatoj?

Jukka Pietiläinen, prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando, cerbumas jene en la ĵusa numero de *Esperanto-lehti*, organo de EAF, pri toleremo kaj minoritatoj:

"Pli altgrada nivelo ol toleremo estas akceptado kaj favorado de diverseco kaj de minoritatoj. Se por toleri sufiĉas lasi la minoritatojn vivi sian propran vivon, se ili ne ĝenas la vivon de la plimulto (kaj adaptiĝas al postuloj de la plimulto), por akcepti necesus ankaŭ konatiĝi kun la vivmaniero de minoritatoj kaj lerni de ĝi. Necesus kompreni, ke diverseco ne estas io tolerenda aŭ -inda, sed interesa fakto, kiun oni ne nur toleru, sed favoru kaj antaŭenigu."

Ne nur ni interesigas pri la konkludoj, al kiuj venos la esperantista asembleo, sed ankaŭ la amaskomunikiloj kaj fakuloj pri internaciaj rilatoj, minoritatoj kaj pactemoj.

inko

Världskongressen i Tammerfors 22—29 juli 1995

Kongressavgifter i svenska kronor:

Kategori	till 95-03-31	efter 95-04-01
Ej direktmedlem i UEA	1530	1810
Direktmedlem i UEA (ej MG)	1220	1460
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1995-01-01) som ej är direktmedlem i UEA	910	1090
Medföljande, handikappad eller ungdom som är direktmedlem i UEA	610	730

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 74-12-31 betalar ingen kongressavgift.

Avgifterna kan komma att justeras uppåt i händelse av kursändring.

Anmälningsblanketter för kongressen kan beställas hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415-501 52.

Blanketten skickas tillbaka till samma adress.

All betalning sker till Esperantoförbundets specialkonto, Hörby, pg 14 74 29-5.

Modela Asembleo de UN

Unu programpunkto estos nova: modela Ĝenerala Asembleo de UN. La partoprenantoj/ludantoj en tiu asembleo reprezentos siajn proprajn landojn kaj donos la oficialan starpunkton de la lando pri tiu aŭ alia demando.

La oficiala lingvo de tiu asembleo estos esperanto – el tiu vidpunkto ĝi malsimilos la veran asembleon. Sed estos interese vidi, ĉu la asembleo en Tampere multe diferencos de iu pli ofi-

UEA? Javisst!

Om du inte gjort det än, gör det nu: bli medlem i UEA. Särskilt om du funderar på att åka till årets världskongress i Tammerfors.

Välj bland följande:

MA	med tidning <i>Esperanto</i> och <i>Jarlibro</i>	425:-
MJ	endast <i>Jarlibro</i>	170:-
SZ	<i>Societo Zamenhof</i> : tillägg för stödjande medlemmar	+850:-

Betala till Esperantoförbundets specialkonto, Hörby, pg 14 74 29-5. Ange på postgirotalongen ditt namn och adress och vilken kategori du betalar för.

Frågor om UEA-medlemskap besvaras av Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415-501 52.

Studenta kanto

Preskaŭ ĉiun printempon atingas nin demando, ĉu ekzistas traduko de Studenta kanto, kun teksto de princo Gustavo kaj muziko de Herman Säterberg.

Jes, ĝi ekzistas. Ĉi fakte ekzistas dum tre multaj jaroj, eĉ en pluraj tradukoj. Ĉi-flanke ni donas al vi la tradukon, kiun Birger Gerdman faris.

*Kantu en gaja tag' de l' student',
ĝojaj ni estu en temp' de l' junec'.
Batas la koro kun freŝa sent',
apartenas al ni l'estontec'.
Ne jam ŝtormoj sin
trovas en nia kor',
la espero nin
ja nutras per favor'.
Ĉe l'amika deklar' en arbar',
kie kreskas la laŭroj de glor',
kie kreskas la laŭroj de glor'.
Hurá!*

"Synpunkter på språkinläring"

Svenska Esperanto-Institutet inbjuder till seminarium i samband med sitt årsmöte **25 och 26 mars** på Södra Vätterbygdens Folkhögskola i Jönköping.

I programmet medverkar bl.a.:

Till Dahlenburg, Tyskland, välkänd esperanto-pedagog, styrelseledamot i ILEI
Lars Forsman, Karlskoga, informatör, lärare, m.m.
Sara Karlsson, Örebro, "volontär" på *Bona Espero* i Brasilien
Eric Londos, Jönköping, lärare på folkhögskolan (svenskt föredrag)
Atilio Orellano Rojas, Argentina, examinerad Cseh-lärare
Hartmut Traummüller, Täby, lärare i interlingvistik på universitetet i Stockholm.

Seminarier *startar* lördag kl. 9.00 och *slutar* söndag kl. 15.30.

Kostnader: 630:- i dubbelrum, 713:- i enkelrum, exklusive linne (50 kr tillkommer för linne).

Anmälan omgående genom betalning av anmälningsavgiften till **pg 5 15 11-4**, Svenska Esperanto-Institutet.

Förfrågningar: Märtha Andréasson, L Tolsereds väg 2265, 425 42 Hisings Kärra, tel/fax 031-57 11 33

OBS! Ring före anmälan!
(Kolla om det fortfarande finns lediga platser.)

Pli aktive por esperanto en EU

Emma Bonino, unu el la novaj komisionanoj de EU, venas el Italio kaj estis pli frue sekretariino de la radikala partio, en kies kadro okazas internacia kampanjo por esperanto. Sinjorino Bonino celas starigi laborgrupon, konsistanta el esperantistaj spertuloj, kiuj ellaboru raporton pri "la kostoj de lingva ne-komunikado por eŭropaj konsumantoj kaj servo-uzantoj".

S-ino Bonino estas respondeca pri la defendo de la eŭropaj konsumantoj, tial tiu laborgrupo bone agordiĝas kun ŝiaj taskoj. Ŝi jam demandis la germanan ekonomiiston prof. Reinhard Selten (Nobelpremiito en 1994), ke li farigu prezidanto de tiu laborgrupo.

Anglaj liberaloj favoras esperanton

La anglaj liberaloj ne havas multajn seĝojn en la brita parlamento, ĉar la elektosistemo ne estas favora al ili. Sed ili ne estas sensignifaj. En sia pasintjara kongreso ili krom tio faris saĝan decidon apogi la laboron por esperanto.

En rezolucio akceptita de la kongreso ili konstatas, ke akcepto de nacia lingvo por interlingvaj kaj interkulturaj ri-

latoj signifus riskon, ke la kulturo de tiu lingvo premus la kulturon de siaj uzantoj al alilingvanoj. Ili ankaŭ konstatas, ke esperanto ekzistas kaj celas ĝuste plifaciligi komunikadon inter popoloj, sen la riskoj, kiujn alportus akcepto de nacia lingvo. Kun siaj historio kaj uzado sur diversaj agadkampoj ĝi plenumas sian rolon kontentige. Pro tio la liberaloj pretas subteni plian uzadon de esperanto kaj ĉiujn, kiuj deziras uzi ĝin.

Ne eblas ankoraŭ diri, kion tia rezolucio povas signifi, sed esperantistoj membroj de liberalaj partioj povas certe uzi ĝin ene de siaj partioj favore al esperanto. Ne okazas ĉiun tagon, ke la anglaj komprenas, ke monda akcepto de la angla ne estas ia solvo.

Stralsund

La esperantogrupo en Stralsund strebas daŭrigi sian movadon. Ili volas krei denove interesan laboron kaj pro tio ili invitas al:

19-21 majo. Internacia aranĝo speciale por svedaj kaj danaj esperantistoj sub la devizo: "Svedoj kaj danoj sur la spuroj de siaj prauloj en Stralsund".

8-10 sept. Internacia turista renkontiĝo sub la devizo: "Pejzaĝo kaj danoj sur la suda parto de la insulo Rågen".

Pliaj informojn vi ricevos de:
Gertrud Lund, Falkmangatan 7 B,
217 62 Malmö, tel. 040-80550.

Gör en insats!

Esperantoförlaget behöver öka sitt andelskapital för att ge ut nya läro-, ord- och läseböcker, romaner, bokkassetter mm. Du kan hjälpa till - antingen genom en egen insats eller genom att få din förening engagerad! Det finns andelsbevis till värdet av **500, 1000 och 10 000 kronor.**

Din förening, och du själv, får teckna hur många bevis som helst.

Esperantoförlaget
MÖLLEVÅNGSGATAN 20 B,
214 20 MALMÖ,
POSTGIRO 578 - 5



"Klopodu kompreni min!" aperis en esperanta vesto

Antaŭ nelonge aperis libreto kun la titolo "Klopodu kompreni min!". Ĝia aŭtoro estas Aira Kankkunen, konata esperantistino el Gotenburgo. La libreto tamen ne estas nova verko. Ŝi skribis ĝin antaŭ 30 jaroj kaj tiam en la finna lingvo. Post unu jaro ĝi aperis en la sveda kaj nun ĝi ekzistas en dek lingvoj. La Espero petis la aŭtorinon rakonti ion pri sia libro.

Kio estas ĉi tiu libro, kaj kial ĝi aperis jam en dek lingvoj?

Antaŭ preskaŭ 40 jaroj mi estis unu el la unuaj personoj, kiuj komencis instruadon de surdaj kaj surdetaj infanoj vartlernejaĝaj en Finnlando. Tiam mi publikigis i.a. korespondajn kursojn por gepatroj de surdaj kaj surdetaj infanoj. Ĉi tiuj kursoj estis uzeblaj por infanoj ĉirkaŭ 2-3 jaroj. Poste, kiam la laborado evoluiĝis kaj oni pli frue diagnozis aŭdodifektojn de infanoj, oni bezonis kurson aŭ instrukciojn por gepatroj de pli junaj infanoj. Oni demandis min, ĉu mi povus skribi instrulibreton ankaŭ por tiuj gepatroj. Tiam (en 1963) mi jam estis en Svedio, sed la demandon mi ricevis de Finnlando, de la Asocio de Surdetuloj en Finnlando. Krome oni sciigis min, ke eblas ilustrati la tekston. Pensante pri la skribota libreto, mi decidis pri tri punktoj:

unue – mi rakontos pri normala infano en diversaj aĝoj kaj post tio pri tio, kion oni eblas fari kun aŭdodifektita infano;

due – la tekstoj devos esti mallongaj, kaj

trie – la desegnaĵoj devos esti simplaj kaj tiaj, ke la desegnita etulo povos esti aŭ knabo aŭ knabino. Ankaŭ ĉi tiu punkto estas tre grava, por ke la gepatroj povu indentigi sian infanon kun la infano de la libreto.

Mi skribis la libreton kaj ricevis hel-

Cu vi scias, ke mi faras rimovadon? Surente aŭ sidante mi povas balanci mi laŭ la ritmo. Ĉu vi povas? Ni aŭskultu muzikon samtempe! Tiam la ludado estas pli agrabila.



pon de desegnistino, kiu vere komprenis la ideon. La libreto ricevis tioman sukceson, kiam mi neniam povis imagi. Mi ne faris specialan reklamon pri ĝi. Ĝi nur troviĝis sur la librobretaro de la Asocio de Surdetuloj en Finnlando kaj en Svedio en mia oficejo kaj hejme. Vizitantoj vidis kaj ekŝatis ĝin kaj volis havi la libreton en sia nacilingvo. Ili ricevis la rajton, senpagan, por ke ili povu traduki kaj doni ĝin al ĉiuj gepatroj. Antaŭ kelkaj jardekoj kaj fakte ankaŭ nun en multaj landoj privataj influgrupoj propagandas kaj prizorgas la agadojn de handikapitoj, aŭ alm-



enaŭ subtenas ilin. Pro tio oni ne povas pensi pri ekonomia gajno, precipe ne, kiam oni faris pioniran laboron por handikapitaj infanoj.

Kio kaŭzis la sukceson de la libreto?

Estas mirinde, ke la libreto ŝajnas esti aktuala ankaŭ hodiaŭ, ĉar oni tradukis ĝin ĉefe dum la lastaj jaroj. Komprenible oni demandas sin, kio kaŭzis la sukceson? Kiam mi planis ĝin, mi jam spertis – pro mia multjara laboro kun gepatroj de handikapitaj infanoj – ke multaj el ili ne kapablas legi longajn ĉapitrojn, pli malmultaj fakliteraturon kun fremda terminologio. Krome mi sciis, ke mi havos je dispono designiston. Pro tio mi decidis fari la libron en formo de bildstria magazino kun mallongaj tekstoj. Al sia simpleco la libreto ŝuldas la daŭran sukceson.

La prezentitaj situacioj estas konataj al la gepatroj kaj ili povas identigi

Mi estas 6-monata

Mi jam sukcesas sidi sen apogo. Mi havas piedfringojn kaj ili ja estas tre mirindaj! Mi povas re kaj re spicori ilin. Ĉu vi rimarkis ilin? Diru, kial ili estas. Diru, kion mi faras per piedfringoj!



sin kaj sian infaneton kun la figuroj kaj eventoj de la libro. Oni bezonas instrui nek la gepatroj nek iliajn infanon, ĉar la realo estas antaŭ iliaj okuloj kaj ili

povas konstati: ĝuste tia estas nia gajulo!

La infano de la libreto estas antaŭ ĉio infano, nek aŭdohandikapito nek lernanto. En la unua ĉapitro ("Karaĝ gepatroj!") estas skribite i.a. jene:

"Ĉi tiu libreto estas por vi kaj por via infaneto... Malgraŭ la handikapo la eta infano ne estas lernanto. Memoru ĉi tion instruante ĝin. Ni nur enmetas vian instruadon en la ĉiutagan vivon atentante la normalan evoluon de la infanoj kaj iliajn eblecojn, akcepti la informon. En la libreto oni montras, kiujn aferojn infanoj kutimas fari diversaĝe. Komprenible la infano estas individuo. Unu evoluas pli malrapide ol alia, kaj pro tio ne ĉiuj aferoj okazas precize samaĝe kiel estas skribite en ĉi tiu libreto, sed grandparte la evoluo pasas ĝuste ĉi tiel..."

Oni povas uzi la informojn de la libreto ankaŭ por ne-handikapitoj.

Kiel la libreto aperis ankaŭ en esperanto?

Ekzakte same kiel la alilingvaj libroj: Andrzej Pettyn vidis la finnlingvan libreton kaj poste la alilingvajn ekzemplerojn hejme ĉe mi. Li tuj volis havi la libreton en esperanto. Tiam mi diris, ke

Jam kiam mi estas „eta“, mi rimarkas, ke valoras plori, ĉar tiam venas plango. Ĉu vi povas helpi min „trou“ la antaŭon aŭ por miaj aliaj voĉetoj? Se iam – estante sola – mi babilelas aŭ alimaniere uzas mian voĉon, venu kaj imitu mian voĉon. Eble mi mem aŭ ne rimarkas, ke mi babilelas.



mi jam tradukis ĝin – por ekzerci esperanton.

Andrzej Pettyn parolis pri "la ne-publikigita libreto" en esperanto-elsendoj de la Pola Radio kaj eĉ skribis pri ĝi en la gazeto *Eventoj*. Harald Schicke en Germanio rimarkis tiun mencion kaj kontaktis min per letere kaj poste ni renkontiĝis en Valencio dum la kongreso, kaj nun ni havas la libreton "Klopodu kompreni min!" ankaŭ en esperanto.

Publikiginte ĉi tiun libreton en esperanto Harald Schicke esperas, ke la esperantlingva libreto povus funkcii kiel pontolibro por eventualaj pliaj tradukoj.

La libro estas havebla ĉe Esperanto-Centro en Stokholmo kaj aĉetebla ĉe MZ-Verlag Harald Schicke, Postfach, D-21244 Buchholz, Germanio

Prezo: 11.80 germanaj markoj.

La ilustraĵoj estas premitaj el la libro "Klopodu kompreni min!" de Aira Kankkunen

"Esperantorörelsen i Göteborg"

Esperanto-Alliansen i Göteborg och Göteborgs Esperantoförening har i slutet av 1994 gett ut en skrift, "Esperanto-rörelsen i Göteborg 1892 - 1992", som på 120 sidor beskriver de 40-tal organisationer som arbetat för esperanto i Göteborgsområdet under 100 år.

Lörnemark, Andréasson, Vilborg, Jalming står som författare och man förstår av den färdiga boken att det är flera års tålmodigt samlande av uppgifter som ligger bakom den.

Boken är tryckt i en begränsad upplaga men kan beställas från Esperanto-alliansen, pg 831 87 23 - 7, för 120 kronor.

Kluba vivo

Malmö

Sub la titolo "Historietoj kaj bonfaraj markoj" renkontiĝis la klubo la 7an de decembro.

Asta Schaedel enkondukis kun historietoj pri inteligentaj hundoj, pri diverslandaj amuzaj opinioj pri virinoj kaj aliaj amuzaj aferoj. Ŝi ankaŭ legis proverbojn el orienta Eŭropo. Tiam ni eksciis ke la pensmaniero diferencas en la mondo, ĉar el kelkaj ni tute ne povis trovi la kernon.

Anna-Greta Strömne montris sian kolekton de "bonfaraj markoj". Tiuj markoj estas eldonataj antaŭ la kristnaskoj. La unua marko de la 15-an de dec 1904 kostis 2 oerojn kaj oni vendis 6 milionojn da ĝi. Nun ili kostas 50 oerojn kaj oni vendas po 18 milionoj. Antaŭ 1960 troviĝis nur unu bildo poĵare, sed nun la tuta folio estas vera pentraĵo. Famaj artistoj kiel Jenny Nyström, Prico Eugén kaj Gunnar Brusewitz pentris ilin. La kruco sur la marko estas la t.n. Lothringen-kruco. La neta profito de la vendado iras al la asocio kontraŭ tuberkulozo kaj kormalsano. Estis tre interese aŭdi la malantaĵon de la markoj.

Ni kune ankaŭ aŭskultis la radio elsendon kun Lars Forsman kaj lia lernantoj, kiuj bone informis pri esperanto.

El La Folio

Stockholm

28—29 januaro ordnade stockholmsklubbarna gemensamt en intensivkurs för nybörjare och "rekomentantoj".

Roland Lindblom

Upplands Väsby

Tillsammans med Upplands Väsby FN-förening och Vuxenskolan har Esperan-

to i Väsby haft information om esperanto samt en "minikurs".

Ole Hansen

Skövde

La klubo biblioteko riĉiĝis je pluraj titoloj, i a:

Denaska kongresano, kasedlibro de Sten Johansson.

Ne-PIV-aj vortoj, listo de 6800 vortoj ne troviĝantaj en PIV, de André Cherpillod.

La Esperanto-fonetiko en praktiko, kajero kaj 2 kasedoj, de Andrzej Pettyn.

Beltono, kasedo kun malnovaj kantoj.

Emilo en Smolando, kasedlibro

Sendube vizitinda biblioteko!

La klubo ankaŭ eldonas tre interesan folion en la sveda lingvo. Estas tradukitaj eltondaĵoj de esperantaj gazetoj. La nomo de tiu estas *Världen Runt med Esperanto* (VrME).

Mi proponas novan nomon nome VÄRME, ĉar mi opinias ke ĝi montras la flamecon de la esperantistaro. Ĉiuj povas esti kunlaborantoj en tiu projekto—estas bona informfolio por ĉiuj kluboj, laŭ mia opinio.

Kontaktu K-G Gustafsson, Aspvägen 1 A, 541 41 Skövde, se vi havas kontribuojn aŭ se vi volas aboni ĝin (40 kr 4nr/jare).

La leganto: Kaisa Hansen

Raporto de Karlskoga

La aŭtuna semestro estis interesa: ni havis 18 partoprenantoj el Svedio, Norvegio, Danio, Finnlando, Hispanio, Rusio kaj Tanzanio. Kvar ĵurnaloj atentigis niajn kursojn kaj ni povis aŭdigi niajn voĉojn en kvar radioprogramoj, i a kvaronhora programo en Kanalo 1, fakte, kiu kreis tre grandan intereson en nia lando. Kontaktis nin komputil-firmaoj, flugkompanio kaj kelkaj Ĉinio-vojaĝantoj.

La partoprenintoj en la kurso ne forgesos la multajn kunvenojn kun teatra legado kaj ĉiam bela kantado de Nata kaj Andreo.

Dankon al iuj por mirindaj monatoj en Esperantujo. Nun ni atendas la video-dokumentadon de Georgo—por la tuta semestro!

La printempa instuista kurso ne okazos. Estis nur ses interesitoj. Okazos tamen vesperaj kursoj kaj kelkaj lecionoj en la EU-lako.

La someraj kursoj, 3-nivelaj, okazos inter la 14a kaj 18a de junio 1995.

Aŭtune okazos denove tutsemestraj kursoj: komencanta 21/8—13/10; daŭriga 23/10—19/12 -95. Jam ekzistas aliĝintojn al ambaŭ kursoj.

Lars Forsman

TRA LA LANDO

Esperantoexamen

Esperantoexamen ger såväl kursdeltagare som självlärdare ett bevis på resultatet av studiemöden. Svenska Esperantoinstitutets skriftliga översättningsprov för högre och lägre examen i esperanto äger rum på olika platser i landet **söndagen den 7 maj 1995**. Vid provet för lägre examen är det tillåtet att använda ordbok.

För information och anmälan, kontakta **Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg, tel. 031-40 52 74**.

Stipendia fonduso en Skövde

Skövde Esperantoklubb decidis dum sia jarkunveno starigi fonduson por stipendioj. Ĉiun jaron tri partoprenantoj en la daŭrigaj kursoj en Karlskoga povos ricevi po 1000 kr. La kondiĉo estas, ke la lernantoj estas el Afriko aŭ el eksa Sovetunio.

La fonduso starigis memore al la klubo membro Gunnar Mattsson, kiu mortis en 1988.


NEKROLOGO

Mortis **Gustav Stenholm**, esperanto-veterano el Skara. Li naskiĝis en 1917 kaj interesiĝis pri esperanto jam en la junaj jaroj. Profesie li estis instruisto kaj dum kelkaj jaroj misiisto en Afriko.

En lia profunda kristana kredo esperanto havis lokon kiel helpilo por la mondo. Li tre aktivis en KELI kaj ankaŭ foje predikis dum la SEF-kongresoj. Li ofte skribis artikolojn al gazetoj, montrante esperanton kiel solvon de la monda lingvo-problemo.

Börje

Aŭtune Esperanto i Väsby havis dum semajno ekspozicion en la komerca centro de sia komunumo. Sur unu foto, farita de Kaisa Hansen, estas videbla Anita Berg dum la finaranĝo de la ekspozicio.



Falska vänner

MARĜENE

Korespondi deziras:
•••

47-jara franca, viro, lingvoinstruisto en la sveda lingvo por lerni ĝin. "Lingvoj kaj ankaŭ korespondado, esperanto, literaturo, historio kaj vojaĝoj estas mia pasioj. Mi havas edzinon kaj filon. Vian lingvon mi povas legi kaj bushe komprenas, kiam oni parolas malrapide. Mi volus lerni ĝin paroli kaj skribi. Mi volus ankaŭ vidi vian landon kaj volonte akceptus sveda(j)n gas to(j)n."

Robert Pontnau
6, rue du Ségala
F-31180
Castelmaurou
Francio

•••
28-jara viro kun sved(in)oj. Li interesiĝas pri ĉiuj temoj.

Nicolas Joseph-Charles
58, rue Pierre
Trébod
F-33300 Bordeaux
Francio

•••
21-jara mekanika inĝeniero. Kun gejunuloj pri kulturo, historio, lingvoj ktp.
Silvan Muglietti,
7 Triq Sta Tereza,
Ghaxaq ZTN 13,
Malto

•••
31-jara matematikisto pri lingvoj, lingvistiko, literaturo, sciencfikcio, historio kaj filatelo.
D-ro Victor Sirvent,
Apartado postal
20495, Caracas
1020, Venezuelo

En del esperantoord är mycket lika vissa svenska ord, men betyder något helt annat än man väntar sig. Sådana ord kallas "falska vänner". Falska vänner är ett problem i all språkinlärning. *La Espero* startar här en spalt om falska vänner. Första omgången har temat "ätbart", men även en del ord som inte har med mat att göra finns med. Många av de ord som kommer att presenteras i den här spalten är det bra att lära in aktivt, andra räcker det att man känner till passivt, och vissa är väl att betrakta mer som kuriosas.

biskvito = skorpa (torkat bröd), biskvito (porslin utan glasyr)
"Biskvi, makron" (litet bakverk av mandel, socker och äggvita) = *makarono*
"Makaroner" = *makaronioj*. "Skorpa, hårdnad yta" = *krusto*.

karamelo = karamellmassa
"Karamell, hård sötsak gjord av karamellmassa" = *karamelbombo*.

kumino = spiskummin
"Kummin" = *karvio*.

lenso = lins (kamerallins, ögonlins, glasögonlins...)
"Lins" (ärtväxt och dess frön) = *lento*. Ögats lins heter även *kristalino*.
"Linsformad sötsak" = *pastelo*.

mokao = mockakaffe
"Mocka, sammetsartat läder" = *svedledo*.

pastelo = pastill, liten karamell, halstablett
"Pastell" = *paŝtelo* som i första hand betyder "pastellkrita", men även "pastellfärg" (= *paŝtelkoloro*) och "pastellmålning" (= *paŝtelpentraĵo*).

pasto = deg
"Pasta" (allmänt namn för spaghetti, makaroner osv.) = *pastaĵo*. "Pasta, tjock kräm" motsvaras ibland av *pasto*, t.ex. i *dentopasto* = "tandpasta, tandkräm".

pirogo = kanot gjord av urholkad trädstam
"Pirog, rysk fylld paj" = *rusa pasteĉo*.

pizo = ärt, ärt
"Pizza" = *pico* (ibland ser man formen *picao*). "Bönor" i allmänhet = *faboj*. "Bondbönor" = (*ĉeval*)*faboj*. "Sojabönor" = *sojfaboj*. "Kaffebönor" = *kafgrajnoj*, *kafaj faboj*. Ett av de viktigare bönsläktena är *fazeoloj*. Dit hör *verdaj fazeoloj* = "brytbönor, haricots verts".

pralino = brända mandlar
"Pralin, chokladbit med fyllning" = *ĉokolada bombo*.

salato = sallad (blandade grönsaker och liknande maträtter)
Växtsorten "sallad, sallat" = *laktuko*.

sandviĉo = dubbelsmörgås
Det svenska "sandwich" betyder numera "liten finare smörgås". Det motsvaras närmast av *sandviĉeto*. Smörgås i allmänhet = *buterpano*.

sinapo = växten senap
"Senap" som krydda = *mustardo*.

siropo = saft (sockerlösning med frukt e.dyl.)
"Sirap" = *melaso* (som även betyder "melass"). *Suko* = "sav, växtsaft, köttsaft, råsaft, juice".

vinbero = vindruva
"Vinbär" (buske eller bär) = *ribo*.
"Vinranka, vinstock" = *vinberujo*, *vinarbodo* eller *vito*. *Uvo* = "vindruva (avsedd att ätas)".

Läsare som har synpunkter på denna spalt eller tips om intressanta ord att ta upp, är välkomna att skriva till redaktionen (La Espero, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm).

Bertil Wennergren

Nova tasko

Jen la traduka angulo revenas kun nova tasko. Ĉi-foje la tradukota teksto estas espereble iom pli facila, certe iom pli hejmeca, kaj sendube pli mallonga, ol normale. Eble iuj rekonas la situacion de la kompatinda verkinto. Viajn tradukproponojn vi sendu ĉi-foje antaŭ la fino de marto al *Bertilo Wennergren*, *Sannadalsvägen 4, 117 65 Stockholm*. Do, ek al la vortaroj!

Bullrande stuga

Jag bor ovanpå en tvättstuga som bullrar sent på kvällarna så att jag inte kan sova. Egentligen är det bara tvättid till klockan 21, men eftersom inte strömmen stängs av då passar folk på att tvätta långt in på nätterna.

Jag har kontaktat min hyresvärd, en privatvärd, och föreslagit att han sätter in en timer som stänger av strömmen kl. 21, men ingenting händer. Vad kan jag göra? Jag har hört att man har rätt till reducerad hyra om man bor ovanpå tvättstuga, stämmer det?

Bertilo

NEKROLOGO

Oskar Svantesson

Den 11 januari dog Oskar Svantesson efter en nära sekellång levnad.

Redan som 14-åring hade intresset för esperanto vaknat hos honom, men han lärde sig det först på folkskoleseminariet i Karlstad av en annan känd esperantist, Einar Dahl. Som nyutexaminerad lärare kom han först till Norrland, men ganska snart flyttade han till Göteborg, där han blev kvar som en av de mest aktiva esperantisterna.

Oskar engagerade sig särskilt inom undervisning av esperanto. Under en följd av år var han aktiv i ILEI, lärarnas internationella organisation. När Svenska Esperanto-Institutet fick sitt säte i Göteborg, blev han en av direktionsmedlemmarna.

Ett annat viktigt område var för honom information till esperantister, särskilt i Göteborgs-området. Hans cirku-

lar *Letero* (senare omdöpt till *Mundo*), kom ut i ett stort antal nummer. De behandlade inte bara esperantonyheter på det lokala planet, utan även på riks- och internationell nivå.

Under en tid var han redaktör för *La Espero* och en period gav han ut ILEIs tidning.

Hans sista stora arbete var inskrift på datarensor av Ebbe Vilborgs stora svensk-esperantiska ordbok. Tyvärr fick Oskar aldrig se ordboken i färdigt skick. Den blev klar strax efter att hans sjukdom brutit ut, en sjukdom som gjorde att han var omedveten om omvärlden under de sista åren.

För sitt mångåriga arbete för esperanto blev han 1984 vald till hedersmedlem i Svenska Esperantoförbundet.

Märtha Andréasson

El Tanzanio persone

Nyambona Mas-samba, ĵurnalistino el Tanzanio, vizitis ankaŭ al la EsperantoCentron de Stokholmo (fotis Anita Berg)

Nyambona Mas-samba partoprenis la daŭrigan kurson ĉe la Popolaltlernejo de Karlskoga per la subteno de diversaj svedaj esperantistoj. Jen kion ŝi skribas pri sia tempo en Karlskoga:

Antaŭ kelkaj jaroj estis normale por afrika patrino naski ses infanojn, do ŝi kutimis zorgi la familion pri ĉiuj bezonataj aferoj.

Okazis laŭ tiu afrika maniero en la Popolaltlernejo de Karlskoga je la fino de la jaro 1994. Lars Forsman, instruisto de esperanto en la lernejo instruis diversajn studentojn el ses landoj.

Imagu tiun kondiĉon: li trovis 18 studentojn kaj ĉiuj parolis sian gepatran lingvon. Li mem parolis kun ni en esperanto.

Mi dankas Dion, ke post kelkaj minutoj neniuj krokodilis, ĉar ĉiuj provis paroli la lingvon, kvankam ne tre klare, sed nia instruisto komprenis nin.

Ho jes, mi memoras, kiel mi komencis, hezitante mi parolis, sed sen krokodili. Kun kiu mi povus krokodili en la svahila? Verŝajne neniuj, mi estas el Tanzanio, alia venis el Rusio, Danio, Finnlando, Norvegio kaj Svedio. La solvo estis nur: ni parolu esperanton.

Lars Forsman, nia kara instruisto, uzis multe da tempo por familiigi nin en nia belega hejmo Esperantujo. Je tiu okazo mi devas gratuli lin ĉar li bone batalis por la lingvo kaj por fari nin infanojn de unu patrino.

Li ne nur instruis en la klaso sed ankaŭ laŭ instruista maniero, ĉie. Saŭnante, kuirante, biciklante, dancante, manĝante ni lernis la lingvon.

Mi ne scias, kiel mia kara instruisto Lars batalas por la lingvo ankaŭ en la lernejo, sed hazarde mi aŭdis. La lastan tagon, antaŭ ol mi forlasis la lernejon, kelkajn minutojn mi intervjuis la rektoron de la lernejo. Mi ne volas rakonti ĉion, kion mi parolis kun li, sed kion mi memoras estas lia frazo: "Mi pensas, ke Lars Forsman pravas, kiam li diras, ke iun tagon esperanto iĝos lingva komunikilo en EU, ĉar oni ne povas daŭrigi pagi multe da mono por tradukistoj".

Nyambona P. Massamba, Tanzanio



IJK-95

La ĉijara IJK (Internacia Junulara Kongreso) okazos en Peterburgo inter la 31a de julio kaj la 8a de aŭgusto (la semajno post la Universala Kongreso en Tampere).

La temo estas "Aktivismo: Junularo, kiu ne nur dancas".

La Rusa E-junularo invitas ĉiujn sperti interesan urbon kaj partopreni aktivan (kaj ankaŭ dancantan) kongreson. IJK-95 sekvas la tradiciojn de la sovetiaj junularaj E-tendaroj, kun sia speciala etoso. Sed ĉi-foje ankaŭ haveblas komfortaj ĉambroj.

Petu vian aliĝilon de:
Kajsa Larsson, tel. 08 - 97 46 26
Lilla Sällskapet v 50 Kv
127 61 Skärholmen

Kajsa ankaŭ provos organizi komunan vojaĝon de Stokholmo.

... kaj perletere

Plurfoje dum la jaroj tanzanianoj petis fotilon por sia esperanto-klubo. Per fotilo eblus enspezi monon por kluba laboro kaj studoj. Tanzania Esperanto-Asocio ricevis donace fotilon kaj ludonis ĝin al klubano en vilaĝo en nordokcidenta Tanzanio. Monate li devis pagi tŝ (tanzaniaj ŝilingoj) 2000 al la kaso de TEA. Li kunportis la fotilon, kiam li iris en la vilaĝon kaj ofertis foton al la homoj, kiujn li renkontis. La fotilo fariĝis bona enspezo por li, sed bedaŭrinde ĝi paneis. Jen lia rakonto:

"Kiam mi ricevis la fotilon, mi unue ne estis bona fotisto. Mi perdis preskaŭ tri filmojn, poste mi lernis kiel uzi ĝin.

Fine mi sukcesis kaj komencis enspezi. Ĝenerale mi aĉetis la filmon por tŝ 1000 kaj mi fotis gehomojn, kiuj pagis al mi la sumon de tŝ 200.

Rivelado kaj kopiado kostis tŝ 1800. Do entute filmo, rivelado kaj kopiado

kostis 2800 kaj mi gajnis 200x36 = tŝ 7200. Por unu monato mi bezonis 3—4 filmojn.

Nun la kostoj altiĝis kaj oni aĉetas filmon por tŝ 1500, fotas unu foton por tŝ 300. Rivelado kaj kopiado estas tŝ 3000. Pro tio, se mi povus fari 36 fotojn en unu filmo, mi kolektus la monsumon de tŝ 10800, minus tŝ 3000 por rivelado kaj kopiado, kaj tŝ 1500 por filmo. Ŝajnas, ke mi havus tŝ 6300 da profito. Se mi povus fari 4—5 filmojn monate, mi enspezus tŝ 25000—31000 po monato."


Mulele S Mbassa, Kangetutya

[Afranko de letero al Eŭropo momente estas tŝ 270. Lastsomere la minimuma salajro estis tŝ 9000, per kio unu persono ne povas vivteni sin. Mulele tre sopiras alian fotilon, kaj same membroj de aliaj kamparaj vilaĝoj.]

Malmö Esperantoförening
Kronetorpsg 94
21227 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

KRUCVORTA ENIGMO



Horizontale

- 1 Parolas en nacia lingvo
- 2 Rebonigas – La dua noto
- 3 Rusa Johano – Seĝ’ por reĝo
- 4 Fel’ – Ŝateginda (Rad.)
- 5 Rilate al kreo de superfluo
- 6 Reĝa moŝt’ – Sci’
- 7 Stomak’ – Verdej’ en urbo
- 8 Tersurfaco – En neniu loko
- 9 Pagil’ – Mallonga (Rad.)
- 10 Granda urbo en Nederlando

Vertikale

- A Sporplanta
- B Fluanta akv’ – Odor’
- C Variaĵo de kvarco – Sentum’
- Ĉ Membro de ĥoro
- D Multekosta metalo – Rondir’ – Subjunkcio
- E Prepozicio – Spirgas’ – Adverbo, “ne pli ol”
- F Terkol’ – Senig’
- G Estas ofte tro kuraĝa
- Ĝ Frato de Moseo – Teĝi per oro
- H Malĝentila eco

SOLVO DE 94/5-6

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	M	A	L	G	R	A	N	D	A	N
2	E	T	E	R	O	E	O	N	A	
3	L	A	V	A	S	E	R	A	R	
4	A	K	A	P	A	R	M	O	V	
5	N	O	T	O	U	R	A	N	A	
6	K	N	A	L	A	S	N	L		
7	O			O	S	T	I	T	O	
8	L	E	O	N	T	O	D	O	J	N
9	I	K	S		R	E	J	A		
10	A	S	T	R	O	M	O	N	D	O

Respondecas pri turneoj

En la jarkongreso en Höör novelektiĝis al la estraro de SEF Jill Hilford, kiu loĝas en Helsingborg. Ŝi estas nia prizorganto de turneantaj esperantistoj, kiam troviĝas realigeblaj proponoj.

La personoj, kiuj proponas sin por turneoj, estas plej ofte interesaj, sed ne ĉiam ni povas akcepti ilin. Tre ofte taŭgas al ili veni en la somero, sed, kiel vi bone scias, tiam Svedio estas "fermita". Se malgraŭ tio via klubo havas eblojn akcepti turneantojn en junio, julio kaj aŭgusto, bonvolu informi al Jill (adreso sur p. 2), tiel ke ŝi scias tion.

Ĉu interesus vin, ekzemple, aŭdi prelegon pri vinfarado (kun gustumado!), kiun germano, vojaĝonta per propra ruldromo al la Universala Kongreso en Tampere, pretas fari en julio? Rapidu mendi lin! Kaj li estas nur unu el tiuj, kiuj proponis sin.

Sed ankaŭ post la somero prezentos sin kandidatoj. Kaptu la okazon! Plej ofte temas pri personoj kun grandaj spertoj kaj kun bona lingvokono. Ilia vizito pliriĉigos la kluban vivon kaj vian propran lingvon.

Lennart Persson

Manuskript till La Espero

Du kan skicka dina texter till *La Espero* på olika sätt. Helst tar vi emot dem på diskett (Macintosh eller PC), men vanligt papper eller elektronisk post är också möjliga. Använd följande adresser:

- Allmänt, skrivna manus, klubbnotiser: Kaisa Hansen, Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby
- Disketter: Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 42 Tyresö
- Elektronisk post: Agneta Emanuelsson: m8980@msg.abc.se
- Telefax: 08 - 590 864 61

När du skickar en diskett, bifoga alltid en utskrift av texten, för säkerhets skull. Vi ser dessutom hemskt gärna att du bifogar ett eller flera foton till dina bidrag. Både disketter och foton får du självklart tillbaka.

Se Peĉjo ne semos,
Petro ne rikoltos.

[ETT ORDSPRÅK PÅ ESPERANTO SATT MED TYPNSNITTET TRANSPORT, TECKNAT AV FRANKO LUIN 1995]



OMNIBUS TYPOGRAFI: Formgivning, fotosättning och rippning.
Produktion av allehanda trycksaker på svenska, esperanto och andra språk.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 TYRESÖ · TEL. 08-742 83 36 · FAX 08-712 39 93